

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

Danko-mesaĝo al niaj karaj legantoj eksterlandaj

AIDA Yayoi, la Prezidanto de Jokohama Esperanto- Rondo

En la okazo de la ĉi-foja katastrofo de la nordorienta Japanio en la 11a de marto 2011, ni ricevis de vi varmajn vortojn de kompato kaj kuraĝigo. Pro tio ni esprimas nian profundan dankon. Feliĉe niaj membroj spertis preskaŭ nenan damaĝon, kaj tamen la senprecedenca grandeco de la natura ruinigo turmentis nin en la kompato al multaj suferantoj rekte atakitaj en la regionoj. Kvankam ni ne povas senti ilian malĝojon en la vera senco de la vorto, ni preĝas, ke ili iam restaru el la koŝmaro. Aldone al la tertremo kaj cunamo, krizo de la atomcentraloj nun naskis doloron kaj teruron. Estos longa longa tempo ĝis japanoj akiros refojan prosperon. Ni devos antaŭeniri krutan vojon. Ni tamen iros kunhelpante kaj kuraĝigante unu la alian.

Ni volas danki precipe al jenaj personoj:

Anatoli Ionesof (Uzbekio), Otto Vaske (Brazilo), Julia Petrenko (Ukrainio), Nada Baliharova (Ĉeĥio), Joseph Cartil (Francio), Eugene Papciak (Francio), Tatjana Auderskaja (Ukrainio), Gabi Kamazki (Pollando), Fuksima Rumi (Rusio), Ĉina Radio Internacia, Brone Aŭkstikalniene (Litovio), Irena Augutiene (Litovio), Alice Liu (Ĉinio), Kane Yu (Ĉinio), Ji Yingeng (Ĉinio), Hanu IM (Koreio), Kiti (Bulgario), Phong Mai (Vjetnamio), Josef (Ĉeĥio), Andi (Danio), Lernu!, La Odesa Branĉo de Nacia Ekologia Centro de Ukrainio (Odeso, Ukrainio), Dorota Burchardt (Pollando), Barbara Pietrzak (Pollando), MIN Hyeonkyeong (Koreio)

NIAJ PLANOJ

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (=Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama.

*Regulaj Klasoj en sabato

Oni planas renovigon de la regulaj klasoj, do jenaj estas provizoraj.

(1) Daŭriga Kurso, post la februare finiĝinta rudimenta klaso.

(2) Meza Klaso 1: Oni legos "Nova Esperanta Krestomatio".

(3) Meza Klaso 2: Oni legos "Tra Dezerto kaj Praarbaro".

(4) Meza Klaso 3: Oni legos "Vivo de Lanti".

(5) Jokohama Salono: La 1-an semajnon kaj la 3-an oni legos el "Vojaĝo en Esperanto-Lando". La 2-an semajnon oni poluros esperantolingvan eseon originalan, dum la 4-an semajnon oni poluros esperantigitan tradukaĵon.

***Hama-Ronda Vespero** apr. 16 (sab)
17h00-19h00, ĉambro 709

Temo: la 16 reguloj de Esperanto (en la japana)
Prelegos: s-ro SIBAYAMA Zyun'iti

***Hama-Ronda Vespero** maj. 21 (sab)
17h00-19h00, ĉambro 710

Temo: Ekskurso tra la misteroj de Romo (en Esperanto, kun bildoj)
Prelegos: s-ro Glauco POMPILIO

■ Eldonas Aida Yayoi ■ Redaktas la organa fako de JER: Miyazaki Hideko
■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

NE OKAZIS

Jenaj kunsidoj ne okazis en marto; Foiro de la urbanaj agadoj en la 12a de marto, sabataj kunvenoj en la 19a de marto, inkluzive de Hama-Ronda Vespero, merkreda kunveno en la 16a kaj la 23a de marto, kaj korusa kunveno en la 19a de marto.

La ne-okazigo estis pro la posta sekvo de la granda tertremo en la 11a de marto; ne pro

vundo aŭ damaĝo, sed ĉar la kunvenejoj de la municipo estis fermitaj, aŭ ĉar la membroj ne emis viziti kunvenejojn kiam “elektro-halto” estis planita pro la manko de elektro kaŭze de tertremaj damaĝoj de centraloj. Dume, kelkaj vizitis la kunvenejon en la 19a de marto por ekspedi la jam presitan martan numeron de Novaĵoj Tamtamas kaj La Tamtamo.



ESEOJ

“Sakura Fronto” moviĝas norden

Mizro Iwaya

Marte, ĉiujare, ĵurnaloj kaj televido raportas la ekfloron de japanaj ĉerizujoj en diversaj regionoj dirante, “Sakura fronto atingis tien kaj alien...” Ĝi ne estas meteologia fronto, kiu signifas abruptan limon inter malvarma kaj varma aeramaso. Ĉi tie ĝi estas analoga esprimo pri la limo inter florantaj regionoj kaj ankoraŭ ne florantaj regionoj. Tiamaniere, la floro de japana ĉerizujo, t.e. sakuro laŭ PIV, tiras nian atenton.

Ni vidas multe da ĉerizujoj en Japanio. Multaj el ili estas arte plantitaj sur montoj, laŭ riveroj kaj laŭ aleoj. Plejparto el ili estas specio de *Prunus × yedoensis*, japane nomata *Somei Yosino*. Ĝi naskiĝis fine de Edo-epoko per hibrida manipulo inter similaj ĉerizujoj. Ĝia pompa beleco mirigis popolon kaj rapide disvastiĝis tra la lando. Ne nur en Japanio sed ankaŭ en aliaj landoj, ekzemple en Vaŝintono, Usono, troviĝas aleo de sakuroj.

Nun, en printempo, fine de marto kaj komence de aprilo, japana popolo amase vizitas vidindejojn de sakuraj floroj. Troviĝas diversaj lokoj kie abundas sakuraj arboj, ankaŭ

en Jokohamo, ekz. ĝardeno Sankeien, Arbara Parko de Negisi, parko Kamonyama, k.a. Ni vidas ke la spektantoj ofte kunportas subtukon kaj manĝaĵon, ĉar ili longe sidadas sub la arbo, kaj manĝadas kaj trinkadas. Jam delonge ni kutimiĝis gustumi la belecon de naturo, kaj lernis ke longa tempo necesas por plene ĝui la belecon de la floroj. Tia tradicio ne elĉerpiĝis ĝis hodiaŭ.

Sakuro estas nacia floro de Japanio. “Japana koro estas reprezentita de sakuraj floroj,” tiel diris fama antikva filozofo Motoori Norinaga. Ja konsentite!



MULTSIGNIFA ĈARMO DE “ANTIKA” VINO (1)

Glauco G. Pompilio

Sub la kuirejo de mia hejmo troviĝas relative malgranda kelo kie mi konservas vinbotelojn kies enhavo datiĝas el antaŭ relative multaj jaroj.

Kvankam mi ne estas vera spertulo en tio, mi tre ŝatas kolekti bondatajn vinbotelojn kaj mi klopodas por tio sekvi certajn bazajn regulojn.

Ses elementoj estas necesaj por bona bondata aŭ “aĝa” vino: grundo, vinberplanto, produktanto, naskiĝjaro kaj aĝiĝo.

Nur kiam ĉiuj tiuj elementoj estas ĉemane, eblas havi la ĝustan botelon, kiun oni povas donaci al amiko je speciala okazo aŭ kiu povas esti gustumita kun respekto aŭ kiun oni konservas, kiel mi faras, kiel valoran kolektaĵon.

Ekzistas tiu kolektanto kiu fieras montri tre malnovajn botelojn.

Por li gravas la formo de la botelo, la formo de la ŝtopilo - nepre el korko -, la etikedo, la unikeco de la botelo kaj la kompleteco de la kolekto, la historio kiun ĉiu botelo povas rakonti - kiel ĉiu ajn antikvaĵo.

Tiu kolektanto ne interesiĝas pri la senkolora kaj senaroma likvidaĵo en la botelo, fakte li tute ne ĉagreniĝas pro tio.

Por li tio ekzistas nur por doni al la botelo la sencon de morto, de fino - esenca elemento de la duba ĉarmo eliĝanta el ĉio apartenanta al la pasinteco.

Kaj ekzistas tiu kolektanto kiu volas doni al la familiano aŭ al amiko originalan, nekutiman donacon.

Kaj tion farante li revivigas malnovan kutimon laŭ kiu, je naskiĝo de filo, oni konservas plurajn botelojn de bonkvalita vino, de tiu jaro, por ĝin gustumi je specialaj okazoj dum lia vivo.

Kaj jen tiam alvenas la problemo, la demandsigno: kiel havigi al si botelon de gustuminda maljuna vino?

Ĉar, por ke antikva botelo ne havu senkoloran kaj senaroman likvidaĵon, sed plengustan aĝiĝintan vinon, necesas serĉi kaj trovi malnovan botelon kun la taŭga vino.

Mi havis okazon, antaŭ kelkaj jaroj, ĉeesti la elkorkiĝon de botelo el la jaro 1955 kun

vino kompreneble enboteligita kaj konservata laŭregule.

Je la malŝtopigo de la botelo ne elvenis fortaodoro, ĉar la vino estis tiom longe en malgranda spaco.

Ja elvenis subtila sed kontinuaodoro, ĉiam pli kaj pli penetrantaodoro.

Tiam tenante la glason, rigardante al ĝi kontraŭlume, oni ĝin delikate ŝvebis lasante la vinon iomete aeriĝi.

Ĝia koloro estis brike ruĝa, kaj kiam kelkaj gutoj estis faligitaj sur blankan tukon ĉirkaŭ la makulo aperis helkolora ringo (nomata “ungo”). Pli larĝa la ringo des pli maljuna la vino.

Vino el taŭgaj vinberoj, kiel la konata Barolo, kaj kiu havis la ŝancon naskiĝi en bona jaro, povas montri belegan “ringon”.

Vi gustumas ĝin, tio estas ke vi puŝas ĝin kontraŭ via lango kaj tiam kontraŭ la palato, kaj vi sentas ian guston kiu kaptas vin, jukas vin, sed super ĉio tiklas vin.

Kaj, antaŭ ol gluti ĝin, vi sentas la odoron de velkanta rozo - jes! vere vi flaras rozon.

Fine, dum la vino malrapide englutiĝas, eklipsiĝanta gudra gusto venas al vi, la gudra gusto kiu apartenas ne ĝuste al malnovaj vinoj, sed al altnivelaj malnovaj vinoj.

Vera “maljuna” vino donas al la trinkanto la eblecon ĝui ĉiujn tiujn gustajn nuancojn dum ĝi malrapide malsupreniras la gorĝon.

Normala vino, eĉ bona vino, kontraŭe estas monotona, ĝiaodoro kontinuas en ĝian guston, kaj tie ĝi haltas.

La ŝlosilo de “maljuna” vino troviĝas en tiu varieco de nuancoj.

“Maljunaj” vinoj estas por mediti, por malfermi la menson - kiel kutimis diri la fama franca verkisto Dumas.

Multaj se ne preskaŭ ĉiuj el la grandaj italaj vinoj taŭgaj por fariĝi “maljunaj” naskiĝas en la regiono Piemonte, nord-okcidenta parto de Italio, kies ĉefurbo estas Torino la urbo de la aŭtomobiloj FIAT.

Ili originas el Nebbiolo, tre malnova vinberplanto, patriarko de sia genro.

Ĝiaj plej konataj idoj estas: Barolo, Barbaresco kaj Gattinara.

(daŭrigota)

BELETRO



Mirinda Ĉapelo (1)



KOMENTARIO

[SIBAYAMA Zyun'iti]

*La verkinto: TOYOSIMA Yosio [tojoŝima joŝio, 豊島与志雄], (1890-1955) estis japana novelisto, literaturisto pri la franca lingvo, kaj eljapanigis el la franca la romanon "La Mizeruloj" de Viktor Hugo. Tiu ĉi fabelo "Mirinda Ĉapelo" [『不思議な帽子』] aperis en 1925, en la gazeto "Akai tori (= Ruĝa Birdo)", fama pro la bonkvalitaj rakontoj por infanoj.

*Tradukado: La esperanta versio estas rezulto

de la kooperata traduko de Jokohama Salono (unu el la klasoj en Jokohama Esperanto-Rondo). La verko estis dividita en 8 partoj, kaj la 7 membroj tradukis poparte. En la sabataj lernokunsidoj, oni kritikis la tradukaĵon reciproke, kaj post polurado denove kunmetis sian parton.

Unu el la debatitaj lokoj estis la pronomo por "diablot" en la verko; ĉu "li" aŭ "ĝi", kaj oni fine konsentis uzi "ĝi".

Originalo de TOYOSIMA Yosio

Kooperata traduko de Jokohama Salono

[respondeca tradukinto por parto estas montrita en krampoj]

- 1 -

[de ĉi tie, trad. de SIBAYAMA Noriko]

En kloako sub ĉefstrato de iu urbego loĝis unu diablo. En la mallumo ĝi vivis kun ratoj kaj vesperoj serĉante manĝeblajn malpuraĵojn en la kloako. Iun tagon ĝi trovis lumon de supre enradianta, kaj proksimiĝis al la lumo por esplori kio okazas. Tie ĝi vidis kovrilon de purigtruo duone malfermita. La diablo senintence sin tenis je la truo kaj ŝtelrigardis eksteren, kaj konsterniĝis. Sur la strato homoj svarme cirkulis unuj post aliaj en abunda hela lumo, kaj aŭdiĝis ankaŭ interesa muziko el gramofono.

"Ho, ĝis nun mi tute ne supozis, ke super tiu ĉi malluma kloako tiel bela vigla strato ekzistas. Kiel brila lumo! Kiel multaj belaj homoj paŝas! Kiel vigla kaj pompa! Profitante la okazon, ke purigisto forgesis fermi la truon, mi promenu iomete sur la vigla strato."

La facilanima diablo risorte elsaltis el la kloako, kaj transformis sin en malgrandan hundon kaj ekvadis tien kaj reen en la ombro de aleaj arboj. Kvazaŭ tage brilaj stratoj, bela vigla trafiko, luksaj butikoj kiel palacoj, dolĉaodoro de bongustaj manĝaĵoj, gaja muziko---tiaj aĵoj forte absorbis la koron de la diablo, kiu vagadis senfine.

[de ĉi tie, trad. de AIDA Yayoi]

Baldaŭ noktiĝis pli kaj pli, preterpasantoj malmultiĝis, la fenestroj de vendejoj estis fermitaj, kaj gajaj stratoj perdis viglecon. Rimarkinte tion, la diablo haste reiris al la kloaka faŭko, el kiu ĝi elsaltis. La granda ferkovrilo, tamen, jam estis firme fermita de la purigisto, kiu verŝajne revenis.

"Ja, mia fuŝo!"

La diablo serĉadis aliajn faŭkojn sed ĉiu el ili estis fortike fermita per fera kovrilo, kaj tute ne troveblis iu ajn breĉo por eniri en la kloakon.

"Ho, ve... Kiel mi povu reveni la kloakon?"

La konfuzita diablo ekvagadis laŭ la strato kaj jen ebriuloj jen vendejaj subkomizoj minace forpelis ĝin kiel sovaĝhundon, kaj jen policanoj proksimiĝante al ĝi klakigis sabron. Pro tiaj ĝenoj la diablo tute deprimiĝis. Ĝi volas kaŝi sin ien en la angulo kaj serĉadis ĉirkaŭon malaplambe. Fine ĝi trovis luksan ĉapelvendejon, kiu restas ankoraŭ ne fermita. Neniu estis en la vendejo, nur videblis ĉefkomizo duondormanta en la interno.

"Bona ŝanco! Mi kaŝos min ĉi-nokton en ĉi tiu vendejo."

La diablo eniris nerimarkite, saltis sur montrobreton kaj en la ŝanĝita formo de ĉapelo restis tie senĝene. Post nelonge kelkaj komizoj elvenis el malantaŭa ĉambro, fermis la pordon, malŝaltis la lumon, kaj retiriĝis en la ĉambron. Finfine la diablo trankviliĝis kun savita sento. Samtempe subita laciĝo ĝin trafis kaj instigis al profunda dormo, en la formo de ĉapelo.

(daŭrigota)